

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ joulukuu ♦ decembro ♦ 6/2008



www.sxc.hu

Vintraj Tagoj kun 90-jara Steleto, p. 10

Kial viziti Volgogradon, p. 5 ♦ Zamenhof-tago, p. 7, 16

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 050 365 0037 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 22 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatku 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Börje Eriksson, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

Jukka Laaksonen, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 ✉ jvaleto@kolumbus.fi

Paula Niinikorpi, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Teuvo Alavillamo, Leväsjoentie 535 C, 29810 Siikainen. ☎ 040 536 9728 ✉ fantomo@jippii.fi

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@kotikone.fi

Vilorg Teräväinen, Kaunisharjunpolku 3 E 61, 15800 Lahti. ☎ (03) 734 3978 ✉ vilorg@elmi.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)


Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avooinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>





Lingva esplorado minacata

Suomen kieliä on monia. Kotimaisten kielten tutkimuskeskus, Kotus, ei ole vain Kielikello-lehti ja Kielikorvan radioääni, vaan alan suurin tutkimuslaitos ja laajin arkisto, eikä vain suomea, vaan myös ruotsia, romania, saamea, karjalaa, viittomia.

Hallituksen tuottavuusohjelmaksi nimeämä säästösuunnitelma edellyttää Kotusinkin henkilöstön vähentämistä kolmanneksella. Se olisi kielenhuollon katastrofi.

Oheinen teksti tekee esperantoksi selkoa "tuottavuusohjelmasta" ja sen vaikutuksista. Marraskuun lopulla hallitus lähetti ohjelman uuteen valmisteluun (mutta ei hylännyt sitä!). Vaikuttamisen paikkoja on siis vielä.

Esperantistinäkökulma äidinkieleen on selvä – "propra, denaska, kunkreska, gepatra, interna" (oma, ensimmäinen, kasvinkumppani, perhe, sisäinen). Oma kieli on ihmisen arvokkain omaisuus, itse tietoinen olemassaolo.

Esperantistinäkökulma äidinkieleen on selvä – "propra, denaska, kunkreska, gepatra, interna" (oma, ensimmäinen, kasvinkumppani, perhe, sisäinen). Oma kieli on ihmisen arvokkain omaisuus, itse tietoinen olemassaolo.

La Finnlanda registaro volas ŝpari monon ŝparante homojn. Tio signifas, ke oni malmultigas laborhorojn, laborjarojn, pagatan labortempon. La celo estas, ke taskoj farendaj estu farataj de malpli multaj homoj, sekve laŭ kostoj malaltiĝu. Aŭ! la taskoj koncernaj ne estas tiom farendaj, ne tiel gravaj, ke necesus ilin fari. La registara plano estas nomata "La programo por efikigi la ŝtatajn funkciojn", kaj ĝi celas forigi 14 500 postenojn ĝis jaro 2015.

Oni motivigas la ŝparkampanjon per la fakto ke malmultiĝas homoj en produktiva aĝo; sekve oni bezonas pli grandan proporcion de laborantoj en "produktado", dum en taskoj "ne produktantaj" sufiĉu malpli multaj. Oni mekan-

ike kalkulas, ke altiĝo de meza vivdaŭro, malgrandiĝo de novaj generacioj, do ŝanĝiĝo de populacia piramido en formon alaspiritan de la homaro dum jarcentoj, estas granda problemo. Povus pravi ankaŭ alia opinio – ke la fakto de senprecedenca efikiĝo en la materia produktado liberigas manojn kaj kapojn al tiuj sektoroj de homsocia vivo, kiu rekte rilatas al prizorgado de homoj. Do temas pri organiziĝo kaj divido.

Unu el la viktimoj de la registara logiko pri "produktiveco" estas Instituto por Esplorado de Enlandaj Lingvoj (finna mallongigo KOTUS, *Kotimaisten kielten tutkimuskeskus*). Ĝia tasko estas scii, zorgi, flegi, servi al lingvoj kaj ties uzantoj por kohereco de komunumo kaj interkomprenebleco de ĝiaj anoj. Ni kiel esperantistoj certe aparte bone konscias, ke tio estas por subteni nian ekziston mem kiel komunikantaj estaĵoj. La lingvoj sub la flego de KOTUS estas ne nur finna kaj sveda, sed ankaŭ tri variantoj de samea, cigana, karela, kaj gestlingvoj por surduloj.

La registaro trovis, ke la instituto sen materiaj produktaĵoj amase vendataj en magazenoj kostas trionon tro multe, do forigi necesas trionon el laborantoj. Tio estus katastrofo al ĝia esplora, eldona kaj pedagogia aktiveco.

La plano vekis fortajn protestojn. KOTUS kaj ankaŭ aliaj institutoj minacataj de "pliefikigo" estis defendataj. La reagoj efikis tion, ke fine de novembro la registaro ne akceptis la "efikigan programon" – sed ankaŭ ĝin ne malakceptis, sed resendis ĝin al nova preparado. Tio signifas novan ŝancon al demokrata premo por defendi la instituton.

Ni esperantistoj estas naturaj defendantoj de lingvo natura – propra, denaska, kunkreska, gepatra, interna. Ni aktivu por propraj lingvoj.

Tuomo Grundström

Ĉu kato vivas per dankoj?

Per tiu ĉi numero pleniĝas jam mia kvina jaro en la posteno de ĉefredaktoro. Mi supozas, kaj esperas, ke mia ĉefredaktora kariero nun estas jam pli proksime al fino ol komenco, ĉar plena jardeko en tiu tasko estus jam tre longe.

Mi ricevis multajn dankojn pro bone farita gazeto, sed ankaŭ kelkajn plendojn pro nesukcesaj aŭ disputeblaj agoj. Ambaŭ estas ja bonvenaj. Eĉ en eksterlando mi renkontis menciojn pri la speciale bone farita finna Esperanto-gazeto – kompare kun malbone faritaj gazetoj de iuj aliaj landoj, kiujn mi ja ne volas ĉi tie nomi. Kaj kritiko, kiam difinebla kaŭzo por tio ekzistas, ĉiam helpas fari la gazeton pli bone.

Finna proverbo diras, ke *”kissa kiitoksilla elää”*, (nur) kato vivas per dankoj. La proverbo celas diri, ke homo bezonas ankaŭ monon pro sia laboro – la kato ne bezonas. Oni povas miri la logikon de la proverbo – fakto ja estas, ke kato ne komprenas dankojn, homo povas kompreni. Fakte la dankoj estas bona instigilo por daŭrigi la volontulan laboron, pro kiu oni pagas ne salajron, sed maksimume ioman rekompencan de elspezoj.

Mi ne sentas, ke mi estus farinta tre pezan redaktistan laboron, sed mi konscias, ke mi dediĉis multegajn horojn, kelkfoje sendormajn noktojn, al la gazetaj artikoloj. (Nu, ne pensu, ke mi troe streĉigus min per fari la gazeton نکته – mia vivritmo ĉiam estis tia, ke mi foje ne sentas bezonon dormi, kaj tiam mi simple ne dormas, kaj faras ion alian.) Ĉiam estas ankaŭ aferoj, kiujn mi volus fari ankoraŭ pli bone. Mi volus aperigi la gazeton pli ĝustatempe, mi volus havi pli multajn kontaktojn eksterlanden kaj pli multajn artikolojn de eksterlandanoj, mi volus havi pli regulajn anoncojn pri eventoj de lokaj Eo-kluboj.


Ankaŭ mi volus iom ekvilibrigi la kvantojn

de artikoloj en Esperanto kaj en la finna. Miajn redaktorajn artikolojn mi skribis pli ofte en Esperanto, sed iam en la finna, kiam la temo estis oportuna por tio. Ĝenerale la gazeto havis iom tro malmulte finnlingvan materialon. En ideala situacio la gazeto ĉiam ofertus ion interesan en la finna lingvo por hazarda foliumanto, kiu tute ne komprenas Esperanton, sed havas intereson pri lingvopolitikaj debatoj.

Mia plej granda entuziasmo por gazetfarado estas nun jam ĉerpinta, kaj tion oni povas ankaŭ vidi el paĝkvantoj de EF: komence, jare 2004, ni havis plejparte 32-paĝajn numerojn, sed lasta tiom dika estis 4/2007, kaj post tio plej oftis 20-paĝaj numeroj. Certe tion kaŭzis ne nur mia malkreskinta intereso por aktive serĉi materialon por la gazeto, estis ankaŭ aliaj faktoroj: FEJO en jaroj 2004 kaj 2005 havis tre aktivan periodon, kiu poste ĉerpiĝis, kaj ŝajnas, ke la jubilea jaro 2007, kiam ni aperigis eĉ 36-paĝan kroman jubilean numeron, iel ĝenerale lacigis la finnan Esperanto-movadon.

Mi esperas, ke mi ankoraŭ dum kelkaj jaroj havos fortojn redakti gazeton ĝis merito de pliaj dankoj. Indas ankaŭ memori, ke la dankoj ne apartenas al mi sole, ĉar multe agis ankaŭ aliaj: Nia enpaĝigisto Ilkka faris sian iam neglektatan, sed ĉiam nepran taskon, jam multe pli longan tempon ol mi, ĉiam tolereme, fideble kaj senlace. La aktivajn skribantojn de unuopaj artikoloj mi ne volas ĉi tie mencii per nomoj, la legantoj povas mem vidi, kiuj nomoj ripetigis en subskriboj de artikoloj.

Mikko Mäkitalo




Vizito al Volgogrado

”Kial vi vizitu Volgogradon? Tie nenio vidinda troveblas,” diris amikoj antaŭ nia vizito, ne komprenante kio logas nin. Volgogrado ja estas industria urbo kun 130 fabrikoj kaj uzinoj: kemia industrio, olerafinado, konstruado de maŝinoj, veturiloj kaj ŝipoj. Ĝi estis fondita en 1598, havas milionon da loĝantoj sur 565 km² (Les-tijärvi havas nur 840 loĝantojn sur 559 km².) Volgogrado konstruiĝis kiel longa rubando sur 80 kilometroj da relative mallarĝaj senarbaraj ebenaĵoj inter la rivero kaj altaĵetoj borderantaj ĝin. Kvankam la centro de la urbo jam estas moderne kaj bele rekonstruita kaj plibeligita per parkoj kaj fontanoj, la urborandoj ne ankoraŭ egalas al ĝi.

Volgogrado situas 1000 kilometrojn sudoriente de Moskvo, de kie la flugo daŭras du horojn, sed per trajno la vojaĝo daŭras 18-24 horojn. Ĉe la urbo kruciĝas fervojoj al/de Moskvo, Kaŭkazio, Siberio. Tra la urbo iras eŭropa aŭtovojo L40 kaj ŝipkanalo inter la riveroj Don kaj Volgo. Inter la ĝemelurboj mi menciis Kemi en

Finnlando, Chemnitz en Germanio, Jilin kaj Chengdu en Ĉinio, Hiroŝimo, Torino. Malgraŭ tio ĝi estas ne bone konata kaj eble oni tie ne bone scias, kiel oni vivas ekster la vasta stepo ĉirkaŭanta ĝin. Influas ĝin Azio kaj la peza historio de militoj, precipe tiu de la dua mondmilito, kie la urbo suferegis kaj ruiniĝis.

En Volgogrado agadas du Esperanto-grupoj. Ni vizitis la klubvesperon de unu el ili kaj tie renkontis ses esperantistojn. Junan esperantiston kaj ŝiajn 3-4 studentojn ni hazarde renkontis ĉe fervoja stacidomo/aŭtobusa haltejo. Veturigis nin al la flughaveno Esperante parolanta taksiisto. Nin gastigis esperantista instruistino pri matematiko. Laŭ Pasporta Servo en la urbo troviĝas 4 pliaj gastigantoj. Kial ni ne vizitu la urbon? Estas agrable, sed okazas ankaŭ neatenditaj malfacilaĵoj. La hoteleto en la flughaveno ne akceptas eksterlandanojn kaj ne ekzistas veturigado organizita de la flugkompanio inter la urbo kaj la flughaveno, distanco 20–60-kilometra, tempobezono 1½–2 horojn unudirekten.



Vidaĵo de la supro de la monteto.

Dum nia volgograda semajno ni povis konatiĝi kun vera “daĉo”, ties legomoj kaj fruktoj al ni ekzotaj. Dum unu horo ni krozadis sur la rivero. Ni ankaŭ vizitis Ekonomian Liceon nro 4, kie ni rakontis pri Finnlando kaj pri Esperanto en la angla. La gelernantoj metis al ni demandojn kaj donacis al ni matrojoŝkon. Ni aŭtobuse veturis al vilaĝo de tataroj ekster la urbo, ni vidis ĝian kulturmuzeeton kaj islaman preĝejon, kiu datiĝas de 1825. La vilaĝo havas nur milon da loĝantoj sed tamen du vendejojn kaj lernejon. Survoje imponis min la vasta senarba stepo ebena kaj ĉeakvaj altegaj fragmitaroj, kiujn balancadis senĉesa vento. Plie ni vizitis urbopar-



Aĵoj en la tatar muzeeto.



ton konstruitan de germanaj ”herrnhutanoj” antaŭ ducent jaroj. Kelkaj el ĝiaj domoj estas restaŭritaj helpe de germana mono, aliaj atendas.

Nia plej kortuŝa vizito celis monumentaron pri la batalo de Stalingrado sur ”monteto” Mamajev Kurgan, alta je centoj da metroj. En la monteto kuŝas entombigitaj pli ol 34000 soldatoj. Al la supro kondukas larĝa ŝtuparo el ducent ŝtupoj, sama nombro kiel tiu de la tagoj de la terura batalo pri la monteto dum la dua mondmilito. Ambaŭflanke de la ŝtuparego staras betonaj statuegoj pri vunditoj kaj batalantoj, aŭ altiĝas muregoj kun reliefoj kaj skribaĵoj pri diversaj

Okmiltuna statuego sur la supro de Mamajeva Monteto.

momentoj de la milito. Meze de la vojo ondetas akvobaseno nomata Maro de Larmoj. En ronda solena salonego konstruita je la gloro de la militistoj ĉiam gardostaras kvar soldatoj, dum vizitantoj lasadas florbukedojn ĉe la blanka ŝtona mano tenanta brulantan torĉon. La supron de la verda herbekovrita monteto kronas giganta sed gracia statuego pri Patrino-Rusio, vokanta siajn filojn, kun glavo en la mano. La statuego pezas 8 mil tunojn, ĝia glavo 14 tunojn; kun la glavo kaj la bazo ĝi altas pli ol 100 metrojn. De ĉiuj direktoj ĝi videblas kiel orientilo super la stepo. Se vi komprenas anglan aŭ rusan lingvon, vidu rete <http://mamayevhill.volgadmin.ru> aŭ simple serĉu Volgograd per guglo. Vere indas viziti la urbon.

Saliko



Torĉo brulas en la salono je gloro de militistoj

Estraro decidis

Estraro de EAF kunsidis sabate la 15-an de novembro en la oficejo en Helsinko. Estis kelkaj decidoj kaj multa diskuto.

Financa decido pri ĉi tiu gazeto espereble ne estos akceptita kun terurigo: la abonprezo altiĝas je du eŭroj, 22 simpla abono, 14 por anoj de memrosocietoj (12 por Fejo-anoj). Membrokotizon rajtas ŝanĝi nur jarkunveno; do se vi nun rekotizas vian individuan membrecon, kiu inkluzivas EF, tiu daŭre dume estas nur 18 eŭroj.

Pri membroferoj oni konstatis, ke grupo en Hämeenlinna ĝis nun ne anoncis sian registriĝon. Ne ĉiuj kluboj jam pagis sian kotizon al la asocio; estas memorigataj. – Keith Uber faris mapon pri lokaj grupoj en Finnlando, ĝi estas trovebla per la hejmpaĝo de la asocio.

Estis decidite dato kaj loko de Vintraj Tagoj venontjaraj, Kouvola 14.–15.3.2009. Pri programo, kondiĉoj kaj prezoj vidu informojn kaj aliĝilon en ĉi tiu numero.

Ankaŭ Aŭtunaj Tagoj jam havas lokon. Okazos en Pori, la dato estos fiksita poste.

Zamenhof-tago estos festata en la oficejo kun malfermaj pordoj dimanĉe la 14-an de decembro. En la jubilea dato mem estos donacita Vilho Setälä -medalo al la muzeo de Heinola, havanta la plej ampleksan kolekton de medaloj kaj moneroj.

La tradicia somera kurso en Valamo realiĝos venontjare tuj post somermezo. Estos ankaŭ ekskurso al la malnova Valamo, la monasteria insulo en lago Ladogo.

Estis diskutita kunlaboro inter najbaraj, precipe nordiaj, esp.-asocioj. Estis decidite en venonta UK okazigi kunvenon por tio, rezervi tempon kaj ĉambron.

Tuomo Grundström

Ora monato en Finnlando

Dum septembro 2008, «Ranskalainen pelimanni» (franca folkmuzikistino) havis revan vojaĝon dank'al EAF kaj siaj finnaj geamikoj. Mi vizitis 7 urbojn kaj 2 kamparajn areojn; mi koncertis 13 fojojn: plejparte publike, en Turku, Pori, Tampere, Uudispiha (Iisalmi) kaj Vesanto. Mi ankaŭ akordionumis dum kafopaŭzo de seminario pri maljunuloj kaj kulturo en Rauma. Ĉiufoje publiko aprezis la proponitan vojaĝon tra la mondo pere de lingvoj kaj muziko (14 lingvoj inter kiuj esperanto kompreneble). Kelkaj neesperantistoj poste decidis lerni esperanton: en Turku kaj en Vesanto (3!!); vidu, la landa asocio ne vane malŝparis monon paginte miajn vojaĝkostojn tra Finnlando!

Mi partoprenis al aŭtunaj renkontoj en Heinola [Aŭtunaj tagoj de EAF], pri kiuj mi jam parolis en alia teksto [aperinta en Esperantolehti 5/2008].

Mi ankaŭ vizitis lernejojn: en Laitila, Tampere («suburbo»), Martikkala (Lapinlahti) kaj Ahveninen (Vesanto). En la du unuaj estis 400 infanoj. La koncerto okazis en gimnazejo, unue mi timis ĉar en mia lando kiam infanoj kunvenas po multe, ili tuj estas moviĝemaj kaj bruemaj. Sed en Finnlando, ili lernis klarajn regulojn kaj respekton (laŭ mi...): do ĉiufoje ili kviete vice eniris en la vastan halon, kviete sidiĝis kaj aŭskultis mian koncerteton. Loka esperantisto tradukis mian prezentadon, kvankam mi sukcesis lerni kelkajn frazojn en la finna, post kelkaj koncertoj. Estis bonega okazo montri realan efikon de nia lingvo, ĉu al infanoj ĉu al instruistoj. En la du lastaj lernejoj, infanoj havis okazon fari demandojn post la muzikprezento (dum kiu mi uzis lernejan eŭropan mapon, petante de infanoj ke ili montru kie situas la lando de kie venas venonta kanzono). Estis ege interesa sperto: demandoj estis tre diversaj (Ĉu vi havas alergion? Kiel estas vivi en Francio? Kiu estas via plej



ŝatata finna televidprogramo? Kiun senton vi havas kiam vi alvenas en lernejon por ludi?...)

Plaĉis al mi bildigi diversecon de nia mondo. Do, dank'al EAF, proksimume 900 infanoj aŭdis esperanton en muzika kaj afabla etoso!

Kial mi diris «revan vojaĝon»?

Unue ĉar ege bone organizita de la EAF-estraro: 2 aŭ 3 tagoj en ĉiu urbo, koncerto kaj laŭplaĉa vizito de la urbo kun loka esperantisto. Tiel mi havis tempon sperti ĉiutagan etoson ĉie kien mi iris, ne estis maratono!

Due, ĉar oni ĉie kore, varme, akceptis kaj gastigis min. Neniam mi min sentis sola, fore de mia familio, aŭ kontraŭe, kiel oficiala gasto. Ĉie, amikeco rendezuis, kvankam ni plejparte unuafoje renkontiĝis.

Trie, ĉar mi ricevis eblecon konatiĝi kun pluraj medioj kiuj aparte gravas por mi: tradicia muziko, edukado kaj naturo, kaj kuirarto, historio, ktp...! Mi plurfoje renkontis muzikistojn kaj verifiis ke muziko estas ege grava afero en Finnlando; oni klarigis al mi kiel funkcias finna edukistemo.

Mi malkovris belegan naturon en pluraj partoj de Finnlando. Suno plejofte origis buntan aŭtunan pejzaĝon, vespere lagoj respegulas ĉielon, tiel ke vi ne scias kie estas ĉielo, kie estas akvo;

ruĝa luno, tiel granda kiel mi neniam vidis, gvidis nin dum veturado inter Heinola kaj Iisalmi (poste dum du vesperoj mi atendis ĝin por admiri sian leviĝon super la lago). Barke promeni sole sur finna lago en ora lumo estas neforgesebla sperto. En arbaro, mi ne renkontis barbarojn sed barbarojn: longajn likenojn pendas el abiaj branĉoj, dika musktavolo kovras grundon, mi eĉ fulmvidis koboldon... Kaj en Syvälahti, ĉiutage cigno organizis por mi malsimilan spektaklon; en vasta kampo, ili kunvenis grupe (komence, ili estis 27, post dek tagoj ni nombris 45 el ili!) kaj alvenas fluganta paro: ĉu ili akceptos ilin? Ne ĉiufoje, okazis ordiga batalo... Iliaj krioj sonadis super arbaro, kie homa bruo maloftegas.

Kvare, ĉar mi realigis multjaran revon: dank' al Kimmo kaj Hillevi, mi lernis vimenan plektadarton. Mi ankaŭ iomete helpis al vimenrikoltado (nur iomete, ĉar ni havis tiom alian por fari!!!), kaj precipe ĝuis kamparan vivon en Savo-regiono. Kimmo organizis plurajn koncertojn, en teatro, lernejo, maljunulejo, vendejo (kie mia «salajro» estis fumigita salmo!). Mi ĝuis vilaĝan vesperon, en bela malnova farmobieno, dum kiu pluraj homoj kantis, kaj vilaĝanoj donacis al mi tradican segilon: ĉar ĝi same grandas kiel mia valizo, ni enpakis ĝin sur la valizo, uzante multe da glubando: feliĉe, neniu demandis klarigojn en flughaveno! Kaj nun mi uzas mian savoan segilon por varmigigi min kaj mian domon!

Foriro estis malgaja, kvankam hejme atendis min familio. Sed mi revenos, certe... ne tiel baldaŭ kiel sovaĝaj cignoj, sed same certe!

Nu, pere de esperanto mi malkovris landon pli «profunde» ol se mi estus simpla turistoj; mi ankaŭ ricevis eblecon praktiki mian metion eksterlande: koncerti. Plua pruvo ke esperanto ne nur estas utopio, fantazio, hobia aŭ lingvo de eta fanatikularo, sed vera ilo por ĉiutaga vivo, laboro, kaj mirinda ebleco por sin malfermi al alia socio, alia kulturo.

Fransŭaz' Rochette, oktobro 2008

Alvoko – Kutsu – Kallelse

La laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos dimanĉon, la 15an de marto, 2009 je la 10a horo en hotelo Sommelo, Pallokentäntie 2, Kuusankoski. En la kunveno estos traktitaj la laŭstatutaj jarkunvenaj aferoj.

Esperanto-Asocio de Finnlando – Suomen Esperantoliitto ry:n sääntömääräinen vuosikokous pidetään sunnuntaina 15.3.2009 klo 10.00 alkaen hotelli Sommelossa, Pallokentäntie 2, Kuusankoski. Kokouksessa käsitellään liiton sääntömääräiset vuosikokousasiat.

Esperantoförbundet i Finland håller sitt stadgeenliga årsmöte söndagen den 15.3.2009 kl. 10.00 i hotell Sommelo, Pallokentäntie 2, Kuusankoski. Mötet behandlar de i förbundets stadgar föreskrivna årsmötesärendena.

La estraro – Hallitus – Styrelsen

Vuokko Heinäsuo 1914–2008

La pliĝa generacio de EAF kaj Helsinki-klubo scias sinonimon por "nia panjo". Ŝi estis Vuokko, la unua mastrino-prizorgantino de la oficejo en ĝia unua adreso ĉe Pengerkatu. Ĉiam bonhumora, bonvolema, gaja, ŝi estis la spirito de nia nesto. Veni al Helsinki al oficejo estis veni de hejmo al alia. Sen propra familio, Vuokko prenis nin – almenaŭ ni plijuna generacio tiel sentis – kiel siajn.



Tuomo Grundström

Vintraj Tagoj 2009 en Kouvola

Talvipäivät Kouvolassa 14.-15.3.2009

Esperanto inter blinduloj – Steleto 90-jara

Esperanto ja sokeat – Suomen sokeiden esperantoyhdistys Steleto 90-vuotias

Kunvenejo: Hotelli Sommelo, Pallokentäntie 2, 45700 Kuusankoski

Vintraj tagoj de EAF alproksimiĝas denove – ĉi-foje ni kunvenos en Kuusankoski, kiu venontjare apartenos al urbo Kouvola. Hotelo Sommelo, kiu situas en belega loko ĉe la rivero Kymijoki, estos facile atingebla buse de la stacidomo de Kouvola. Ni povos ankaŭ ĉi-foje ĝui belan ĉirkaŭaĵon.

La tagoj komenciĝos sabate per komuna lunĉo je la 12a. Malfermo okazos je la 13a. Antaŭtagmeze ni aranĝos publikan prezentadon de Esperanto al interesuloj kaj lasos tempon por renkontiĝo kun amaskomunikoj.

Por la tagoj ni havos specialan temon: Nia valora membroasocio Steleto fariĝos 90-jara kaj prezentos al ni multflanke sian agadon. Kiel ĉefpreleganto venos Otto Prytz el Norvegio. Prelegoj tuŝas i.a. temojn pri historio de Steleto kaj kongresoj de blinduloj. Krome ĉiuj havos eblecon konatiĝi kun brajla skribo ankaŭ kiel spektaklo. Estos brajlaj tekstoj, skribmaŝino kun tabulo kaj pincilo. Steleto-anoj montros la uzadon de ili kaj interesuloj povos mem provi skribi. Cetere, venontjare estos ankaŭ la 200-naskiĝdatreveno de Louis Braille, kreinto de la brajla sistemo.

Sabate posttagmeze estos rezervita tempo por ĉiuj membroasocioj, kiuj deziras kunveni dum la VT. Bonvolu informi pri viaj bezonoj al la aranĝantoj de EAF kaj interkonsentu pri la tempo. Notu, ke dum la tagoj okazos ankaŭ la jam tradicia renkontiĝo de membroj de la subtena asocio de EAF, Societo Nino Runeberg.

Sabate ni vesperumas kune. Steleto-anoj

aranĝas plejparte ankaŭ la vesperan programon, inter ili estas multaj muzikaj kaj aliaj artistaj talentuloj. Certe nin atendas distra kaj hejmeca ĉeestado. Ankaŭ la unua verkisto en finlingva dialekto, Hjalmar Nortamo, tradukiĝis Esperanten kaj nin kantigos.

Dimanĉe matene KELF verŝajne aranĝos la tradician matenpreĝon. Je la 9.30 komenciĝos kontrolo de la rajtigiloj por la jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando, kiu okazos ekde la 10a. Post ĝi ni lunĉos kaj daŭrigos la kunestadon kun prelego kaj eventula rondveturo, kiu finiĝos en Kouvola. La detala programo de la tagoj aperos en Esperantolehti 1/2009 kaj niaj retpaĝoj.

Aliĝo kaj kontaktpersonoj

Bonvolu sendi la aliĝilon al la EAF-oficejo de Helsinki aŭ se vi volas aliĝi rete, uzu la adreson eafmendoj@esperanto.fi. Krome pagu la kotizon al la konto de la Asocio uzante la referencnumeron. Notu, ke estas tre grave fari ambaŭ: kaj pagi kaj sendi la aliĝilon por ke ni organizantoj scios, kiu volas kion dum la VT.

Kun eventualaj demandoj pri VT-aranĝoj, programo, tranoktoj, manĝoj, vojaĝeblecoj ktp. vi povas turni vin al EAF-vicprezidanto Päivi Saarinen aŭ al EAF-sekretario Tiina Oittinen, kies kontaktinformoj estas sur paĝo 2. Nia loka kontaktulo estas kouvola-ano Marjaliisa Parpala, tel. 040-7174521 (ankaŭ tekstmesaĝoj), retpoŝto mlparpala@luukku.com. Pri la aliĝiloj kaj pagoj prizorgas Päivi Saarinen.



Ensi vuoden talvipäivät järjestetään Kuusankoskella, joka vuoden alusta kuuluu Kouvolan kaupunkiin. Kokouspaikka on hotelli Sommele, joka sijaitsee luonnonkauniin Kymijoen rannalla. Kuusankoskelle on hyvät bussiyhteydet esim. Kouvolan rautatieasemalta.

Päivät alkavat yhteisellä lounaalla lauantaina klo 12. Avajaiset ovat klo 13.00. Aamupäivällä järjestämme jo totuttuun tapaan esperanton esitelytilaisuuden yleisölle sekä tapaamme todennäköisesti tiedotusvälineiden edustajia.

Päivillä on tällä kertaa erityisteema: Merkittävä jäsenjärjestömme Sokeiden esperantoyhdistys Steleto esittelee toimintaansa, joka on jatkunut jo 90 vuoden ajan. Pääluennoitsijaksi saapuu maailmanlaajuisesti tunnettu esperantisti Otto Prytz Norjasta. Esitelmät ja muut esitykset kertovat meille mm. Steleton historiasta ja sokeiden esperantokongresseista. Lisäksi voimme kaikki tutustua pistekirjoitukseen ja kokeilla itse sen kirjoittamisesta steletolaisten opastuksella. Ensi vuosi on myös Louis Brailleen, pistekirjoituksen keksijän, syntymän 200-vuotisjuhluvuosi.

Lauantai-iltapäivällä jäsenjärjestöt voivat järjestää omia kokouksiaan tarpeen mukaan. Sopikaa kellonajasta ja kokoustiloista Esperantoliiton järjestäjien kanssa hyvissä ajoin. Päivien aikana järjestetään myös jo perinteeksi muodos-

ALIĜILO

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF
14.-15.3.2009 en Kouvola.

Nomo _____

Adreso _____

Tel./Fakso/Ret-adreso _____

Aliĝkotizo

14 e ĝis 31.1.2009 _____

18 e ĝis 28.2.2009 _____

21 e poste _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

VT-paketo ____ 86 e/persono (inkl. tranoktadon en 2-lita ĉambro, tagmanĝojn ambaŭtage, kafon kaj vespermanĝon sabate)

Krompago por 1-lita ĉambro: ____ 30 e/persono

VT-paketo sen tranoktado: ____ 50 e/persono (inkl. la manĝojn menciitaj supre)

Entute pagenda al la konto de EAF _____

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.
Bv. uzi la VT-referencnumeron **4640 (ne skribu aliajn informojn en pagilo)**.

Pliaj informoj aŭ deziroj al EAF: _____

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
Retaj aliĝoj tra eafmendoj@esperanto.fi

BONVENON!

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton talvipäiville 14.-15.3.2009 Kouvolassa.

Nimi _____

Osoite _____

Puh./fax/sähköposti _____

Ilmoittautumismaksu:

14 e 31.1.2009 asti _____

18 e 28.2.2009 asti _____

21 e 28.2.2009 jälkeen _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

Talvipäivien paketti ____ 86 e/hlö
(sis. majoituksen 2 hengen huoneessa, 2 lounasta, päiväkahvin ja iltapalan lauantaina)

1 hengen huoneen lisämaksu ____ 30 e/hlö

Talvipäivien paketti ilman majoitusta ____ 50 e/hlö (sis. yllä mainitut ruokailut)

Maksut yhteensä Suomen Esperantoliiton tilille _____

Tilinumero: Sampo 800017-230825.
Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja viite- tai viestikenttään maksun yhteydessä).

Lisätietoja ja/tai toivomuksia _____

Lähetä lomake osoitteella:
Suomen Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki
tai tiedot s-postitse eamfendoj@esperanto.fi

TERVETULOA!

tunut Nino Runeberg -seuran jäsentapaaminen.

Lauantai-iltaa vietämme yhdessä. Steletolaiset ovat luvanneet järjestää myös viihdyttävää iltaohjelmaa, heidän joukossaanhan on paljon esim. muusikoita. Yhdessäolosta muodostuu varmasti mukava ja lämminhenkinen. Myös ensimmäisen suomalaisen murrekirjailijan Hjalmar Nortamon esperantoksi käännetty lyriikka laulattaa.

Sunnuntaiaamuna KELF järjestäneen perinteisen aamuhartauden. Kello 9.30 alkaa valtakirjojen tarkastus Suomen Esperantoliiton vuosikokousta varten, kokous aloitetaan klo 10.00. Lounaan jälkeen päivät jatkuvat luentojen ja ehkä myös kiertoajelun merkeissä; mahdollinen kiertoajelu päättyy Kouvolan rautatieasemalle. Yksityiskohtaisempi ohjelma ilmestyy seuraavassa Esperantolehdessä 1/2009 sekä nettisivuillamme.

Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Ilmoittaudu lähettämällä ilmoittautumislomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai kertomalla vastaavat tiedot sähköpostitse osoitteeseen eamfendoj@esperanto.fi. Maksa osallistumis- ja pakettimaksut ilmoittautumisen mukaisesti liiton tilille. Muista käyttää viitenumeroa, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita tietoja. Huomaa, että pelkkä maksun hoitaminen ei riitä, tarvitsemme myös ilmoittautumistiedot, jotta tiedämme mitä olet tilannut ja milloin tulet.

Lisätietoja talvipäivien ohjelmasta, majoituksesta, ruokailusta ja matkustusvaihtoehdoista voit tiedustella liiton varapuheenjohtaja Päivi Saariselta tai sihteeriltä Tiina Oittiselta, yhteystiedot sivulla 2. Paikallinen yhteyshenkilömme on kouvolaalainen Marjaliisa Parpala, puhelin 040-7174521 (myös tekstiviestit), sähköposti mlparpala@luukku.com. Ilmoittautumislomakeista ja maksuista huolehtii Päivi Saarinen.

*Tervetuloa – Bonvenon!
Estraroj de EAF kaj Steleto*

Tobiasz Kaźmierski al CO

Dum pli ol kvin kaj duona jaroj en la Kongresa Fako de la Centra Oficejo de UEA laboris nur unu dungito, la Konstanta Kongresa Sekretario. Tiu nenormala situacio ĉesos la 1-an de decembro 2008, kiam KKS denove ekdisponos pri asistanto. Per ĵusa decido de la Ĝenerala Direktoro eklaboros tiam kiel nova oficisto de UEA la 24-jara Tobiasz [Tobiaŝ] Kaźmierski el Pollando.

Tobiasz Kaźmierski naskiĝis kaj kreskis en Poznano. Li studis sociologion en la tiea Universitato je la nomo de Adam Mickiewicz kaj spertiĝis ankaŭ pri merkato kaj vendado. Spertojn por sia nova tasko ĉe UEA li kolektis i.a. kiel kunorganizanto de la fama Esperanto-aranĝo Arkones kaj kiel respondeculo pri la vespera programo de la 61-a IJK en Zakopane en 2005. En 2003 li fondis kun kelkaj amikoj la junularan klubon E-Senco, kiu en 2007 transformiĝis en kulturano-socian asocion kun Kaźmierski kiel unu el la vicprezidantoj. Li partoprenis ankaŭ en la reaktivigo de Pola Esperanto-Junularo, kies vicprezidanto li estis, kaj en la Ekonomia Forumo de Centra kaj Orienta Eŭropo en la pola urbo Krynica en 2007 kaj 2008, kie li helpis prizorgi informstandon pri Esperanto.

(el komuniko de UEA prenis mm)

Buller vizitis Koreion

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA, vizitis Korean Respublikon de la 16-a ĝis la 21-a de oktobro. Li partoprenis en la 40-a Korea Kongreso de Esperanto, kiu okazis en la urbo Busan la 18-an kaj 19-an kun ĉ. 170 kongresanoj. Li prelegis en la kongreso pri la temo “UEA kiel reprezentanto de esperantistoj sur mondaj forumoj” kaj kontribuis ankaŭ al simpozio pri la kongresa temo “Esperanto en perspektivo: En la nova ondo de monda civilizacio”. La kongreso havis tre interesan programon: pluraj fakkunsidoj, prelegoj, riĉenhava interkona vespero i.a.

kun teatraĵo, kaj Esperanto-kurso por infanoj.

Unu tagon la Ĝenerala Direktoro de UEA dediĉis al konatiĝo kun la kondiĉoj por ebla okazigo de Universala Kongreso de Esperanto en Busan en la jaro 2012. Tiu estis la ĉefa diskutemo dum la renkontiĝoj de Buller kun la Busana vicurbestro s-ro An Joon-Tae, kaj poste en Seulo kun la vicprezidanto de la Korea Turisma Organizaĵo s-ro Hong Ju Min kaj la ĉefmanaĝero de la Korea Kongresa Buroo s-ro Jaesung Rhee.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Buller diskutis kun ambasadoro

La ambasadoro de Finnlando en Nederlando, s-ro Mikko Jokela, akceptis la 28-an de oktobro la Ĝeneralan Direktoron de UEA Osmo Buller en la ambasado por duhora interparolado. La ambasadoro faris la inviton, ĉar pro sia ferio en julio li ne povis viziti la Universalan Kongreson en Roterdamo.

Dum la renkontiĝo oni traktis praktike ĉiujn kampojn de la agado de UEA. La ambasadoro estis tre interesita pri la historio de UEA kaj Esperanto, kaj aparte pri la rolo de Esperanto kiel kultura pontolingvo. Tiu lasta temo speciale interesis lin pro tio, ke antaŭ sia diplomata kariero li multe esploris internacian kulturano interŝanĝon, precipe libro- kaj kino-komercon. Liaj esploroj montris grandegan superregon de la angla lingvo kaj ke la interŝanĝo ĉefe signifas kulturano fluon el grandaj landoj al malgrandaj.

(el komuniko de UEA prenis mm)

Institucio Hodler 40-jara

En 1968 la Estraro de UEA lanĉis kampanjon por “fortikigi la financan bazon de la Asocio”. La kampanjo celis kolekti kapitalon, kies rento liveru al UEA ekstrajn rimedojn aldone al kotizoj. Rezulte, la 28-an de oktobro estis starigita

fondaĵo, kies oficiala nomo fariĝis Instituto Hodler '68. Ĝi ricevis propran juran personecon en Nederlando, kun estraro nomumata de la Estraro de UEA. Ekde la komenco ĝi kolektis donacojn kaj pruntojn sen rento aŭ kun malalta rento.

La nuna prezidanto de la Instituto estas Grégoire Maertens, kiu eniris la estraron unuafoje en 1970 kaj estas prezidanto ekde 1986. En la estraro membras krome Ans Bakker-ten Hagen, Renato Corsetti, Ivo Durwael kaj Ilja De Coster, kaj la administranto estas Pasquale Zapelli. La ĉefa havaĵo de Instituto Hodler estas domo en Antverpeno, kiun luas Flandra Esperanto-Ligo kaj la Antverpena Esperanto-klubo "La Verda Stelo". Ĉi-jare la Instituto aljuĝis subvenciojn je la suma valoro de 9200 eŭroj. Projektoj ekster UEA ricevis 1700 eŭrojn.

Kiu deziras prunti aŭ donaci monon al Instituto Hodler, bv. kontakti la Centran Oficejon por pli detalaj informoj.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Kongresa temo kun du dimensioj

En 2009 oni festos la 150-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L.L. Zamenhof. Tre konvene UN proklamis la saman jaron Internacia Jaro de Interpaciĝo. Estis do nature, ke la Estraro de UEA inspiriĝis de tiu koincido, kiam ĝi elektis "Krei pacan ponton inter la popoloj": Zamenhof hodiaŭ kiel la temon de la 94-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto en Bjalistoko. La citaĵo en la vortumo de la temo devenas de la parolado de Zamenhof en la Kembriĝa UK en 1907. La kongresa temo estos vaste traktata en la oficiala programo de la UK, sed la Estraro esperas, ke ankaŭ fakaj asocioj konsideros ĝin en siaj propraj dumkongresaj kunsidoj.

(el komuniko de UEA prenis mm)

Bjalistoka IKU invitas prelegontojn

Dum la 94-a UK en Bjalistoko okazos la 62-a sesio de Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn pri prelegoj al la sekretario de IKU, prof. Amri Wandel (PK 767, IL-71799 Makabim, Israelo; rete: amri@huji.ac.il) antaŭ la 31-a de januaro 2009.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto (kune ne pli ol unu paĝo). La proponintoj estos informitaj pri akcepto aŭ neakcepto antaŭ la 15-a de aprilo 2009. La sukcesaj kandidatoj devos sendi kompletan tekston de siaj prelegoj al UEA antaŭ la 31-a de majo 2009. Pliaj detaloj kaj antaŭaj IKU-prelegoj kaj -resumoj troviĝas en la IKU-paĝo ĉe <http://uea.org/dokumentoj/IKU>.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Donacota

Se vi pagas frajton: Jarkolektoj de diversaj revuoj [mankantaj en krampoj]:

Litova Stelo: Plenaj 1991...2007+eble 2008.

Monato: 1992...2003, [2004, 2005], 2006, 2007, eble 2008.

Scienca Revuo: 1992/kajero 161...[mankas kelkaj] ... ĝis 211.

Nova Bulteno: kelkaj 1992...2000.

IKU-libroj: 1997..[1998], 1999...2007.

Kelkaj: **Internacia Komputado:** 1983...1986.

Fokuso: 1987...1988.

Komputila Rondo: 1991...1993.

Pentti Makkonen,

(nova adreso) Vaasankatu 27 A 19,

FI-40100 Jyväskylä, puh/tel 014-254485.

BET venontjare

Baltaj Esperanto Tagoj okazas venontjare en Paikuse (de 08.07 ĝis 12.07 2009) en ejoj de Policia Akademio. Paikuse estas antaŭurbo de Pärnu, sed Paikuseanoj diras, ke fakte Pärnu estas antaŭurbo de Paikuse. La loko estas bela, la ejoj estas modernaj kaj homoj estas afablaj, do mi opinias ke objektivaj kondiĉoj estas bonaj. Nun estas nia tasko plenumi la tagojn kun interesa kaj enhavoriĉa programo. Ni devas konsideri sperton de antaŭaj renkontiĝoj kaj eviti kutimajn erarojn. Amuzaj vesperoj devus

esti por plejparto amuzaj. Sukceso de somera universitato dependas de interesaj prelegantoj. La ĝenerala temo: kultura kaj lingva diverseco estas vasta kaj senfina studobjekto. Interese estus aŭskulti diversajn komprenojn. Ni volus ke ekskursita tago estu pozitive neforgesebla. Amatorarta konkurso postulas aktivan kontribuon de partoprenantoj. Entute, ĉiuj proponoj por sukcesa programo de BET-45 estas bonvenaj. Baldaŭ ni publikigos jam provizoran programon kaj pli detalajn informojn.

Tõnu Hirsik

BET-45 – Kultura kaj lingva diverseco – 08.07-12.07.2009 Paikuse-Pärnu – Aliĝilo

Familia nomo	_____	Sekso	_____
Antaŭnomo	_____	Tel.n-ro	_____
Naskiĝdato	_____	Fakso n-ro	_____
Profesio	_____	Retadreso	_____
Adreso	_____	Lando	_____

Ĉiu aliĝanto uzu apartan aliĝilon.

Partoprenkotizo laŭ landaj kategorioj kaj aliĝdato en € (eŭroj)

	ĝis 01.05.09	aliĝante surloke
Estonio, Latvio, Litovio	15	20
ceteraj landoj	20	25

Infanoj ĝis 15-jaraj aliĝas senpage. Rabato por lernantoj, studentoj kaj handikapuloj 50%.

Loĝado en hoteloj en Pärnu (prezo ekde 25 €). **Mi preferas loĝi en:** (metu krucon)

hotelo junulargastejo junulargastejo mi zorgas mem pri
pli ol 10 € /nokto malpli ol 10 € /nokto mia loĝado

Bv. peti pli precizan informon pri loĝejoj – ni povas garantii nur la antaŭpagitajn mendojn.

La aliĝilojn bv. sendi: per reto: esperant@hot.ee

per poŝto: Tõnu Hirsik, Vana-Tartu mnt 5-5, Vaida, Harjumaa, Estonio 75302

La aliĝkotizon bv. sendi al: Swedbank konto 1120068196, Eesti Esperanto Liit

IBAN EE982200001120068196. Sendu la kotizon grupe kaj ŝparu la monon! Por la limdatoj validas la dato de ricevado de la pago. Escepte, surloka pagado nur laŭ anticipa interkonsento. La kotizo ne estas repagota, sed estas transdonebla al alia persono.

Dum BET- 45 okazos amatorarta konkurso (kantado, deklamado, aktorado).

Bv. registriĝi al konkurso:

Kontribuo al la programo:

Temo de prelego

Mi legis, komprenas, konsentas kaj aliĝas. Aliĝdato:

Mi pagos € Subskribo

Malfermaj pordoj de EAF

Malfermaj pordoj en la oficejo en Helsinki dimanĉe 14.12.2008 je 14a-17a horo, adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, urboparto Hakaniemi.

Esperanto-Asocio de Finnlando elkore invitas ĉiujn esperantistojn kaj amikojn de Esperanto el Finnlando kaj aliloke viziti la asocian oficejon en Helsinki. Volonte kunprenu viajn geamikojn sendepende ĉu ili jam konas la fenomenon Esperanto aŭ ne!

La aranĝo estas la finnlanda kontribuo por la internacia Zamenhof-tago, kiu ja estas la 15-a de decembro. Por varmigi nian ĉeeston la Asocio regalas vin per jultempaj dolĉaĵoj: tradician trinkaĵon "glögi" (varma spicvino ĉi-foje sen alkoholo) kaj tradiciajn spickuketojn "piparkakut".

Vi povos diskuti kaj babili unu kun la alia kaj konatiĝi kun ĉiuj anguloj de la oficejo: la biblioteko certe vekos vian intereson en la tago de la libro – eble ankaŭ la vendataj libroj.

Avoimet ovet Suomen Esperantoliiton toimittossa Helsingin Hakaniemessä, Siltasaarenkatu 15 C 65, sunnuntaina 14.12.2008 klo 14-17.

Tule viettämään hieman etuajassa Zamenhof-päivää (oikea päivä 15.12.), joka samalla on es-

perantokirjallisuuden päivä, sekä tutustumaan liiton toimistoon ja kirjastoon. Tapaat esperantonharrastajia ja ystäviä eri puolilta Suomea, ehkä muualtakin. Ota mukaan myös asiasta kiinnostunut ystäväsi. Liiton hallitus tarjoaa glögiä ja pipareita ja tietenkin tarjolla on myös myyntiartikkeleja, erityisesti kirjoja.

Esperantoförbundet i Finland håller söndagen den 14.12.2008 kl 14-17 öppet hus på sin byrå på Broholmsgatan 15 C 65, Helsingfors (mellan Hagnästorget och Berghälls kyrka).

Välkommen att en dag på förhand fira Zamenhof-dagen (eg. 15.12) som samtidigt firas som dagen för litteratur på esperanto. Kom och bekanta dig med byrån och dess bibliotek samt träffa gamla och nya vänner av esperanto. Ta med dig intresserade vänner. Förbundets styrelse bjuder på glögg och pepparkakor och naturligtvis går det då också att inköpa böcker och annat med anknytning till esperanto.

Bonvenno!

Estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando

Eventokalendaro de EAF

2008

14.12.2008 je 14-17 renkontiĝo lige al Zamenhof-tago en la oficejo en Helsinki

2009

14.-15.3.2009 Vintraj Tagoj kun jarkunveno en hotelo Sommelo, Kuusankoski/Kouvola

22.-26.6.2009 Esperantokurso en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi kun posta ekskurso al Valamo de Ladogo

25.7.-1.8.2009 Universala Kongreso de Esperanto, Bjalistoko, Pollando

Septembro 2009 Aŭtunaj Tagoj en Pori

Laborkunsidoj

14.2.2009 Estraro

Solstica Festo

FEJO daŭrigos ankaŭ ĉi tiun jaron la tradicion de Solstica Festo. Ĝi okazos en la oficejo de EAF la 21an de decembro. La evento komenciĝos per tostado de varma glögi-trinkaĵo je 14.04, je la momento de la solstico, kaj daŭros en formo de liberforma festado ĝis nedifinita malfrua vespero.

FEJOn perinteinen Solstica Festo pidetään tänä vuonna 21. joulukuuta EAF:n toimistolla ja se alkaa kello 14.04 talvipäivänseisauksen hetken glögimaljoilla jatkuen siitä vapaamuotoisena juhlintana iltamyöhään asti.

UEA-kotizoj por la jaro 2009

Ni estas jam proksime al la jarŝanĝo denove kaj jen la informoj pri kotizoj por la jaro 2009:

Membrokotizoj de UEA en 2008	MG-membro	10 eŭroj	(gvidlibro)
	MJ-membro, MJ-T-membro	24 eŭroj	(jarlibro)
	MA-membro, MA-T-membro	59 eŭroj	(jarlibro + <i>Esperanto</i>)
Dumvivaj kotizoj:	DM-membro, DM-T-membro	1475 eŭroj	25 x MA (jarlibro + <i>E-o</i>)
	DMJ-membro, DMJ-T-membro	600 eŭroj	25 x MJ (jarlibro)

La kotizoj estas la samaj ankaŭ por junaj membroj (naskiĝintaj post 1.1.1979, bv. memori informi naskiĝdaton). La kotizoj por junaj membroj (-T) inkluzivas membrecon en TEJO kaj abonon de *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*. Ankaŭ eblas pagi la jarkotizon de 2008 kaj ricevi la materialon laŭ la koncerna kategorio. Dumviva membreco DM(-T) estos laŭ la malnova kotizo 1450 eŭrojn kaj DMJ(-T) 575 eŭrojn ĝis la fino de la jaro 2008.

Subtenaj membrokotizoj: *Societo Zamenhof* 118 eŭroj
 krom la supra membrokotizo *Patronoj de TEJO* 72 eŭroj (inkl. *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*)
 por subteni la agadon: *Fondaĵoj de UEA (ekz. Fondaĵo Canuto (membro de nepagipovaj aktivaj esperantistoj en UEA))*

La abonoj de la **periodaĵoj de UEA** *Esperanto* 38 eŭroj
 sen membreco estas sekve: *Kontakto* 23 eŭroj
TEJO tutmonde 12 eŭroj

EAF peras ankaŭ **plurajn gazetojn**. Jen kelkaj prezoj:

<i>Monato</i>	49 e (aerpoŝta aldono 4 e), reta gazeto 29,40 e
<i>La Jaro (kalendaro por la jaro 2009)</i>	La Jaro 5 e (tuja sendo + 4 e)
<i>La Ondo de Esperanto</i>	38 euroa (aerpoŝta aldono 5 e), elektr. abono (pdf) 12 e
<i>Litova Stelo</i>	14 e (aerpoŝta aldono 6 e)
<i>Komencanto</i>	18 e
<i>La Espero (sveda)</i>	20 e
<i>Norvega Esperantisto</i>	11,50 e (NOK 100)

Demandu ankaŭ pri **aliaj gazetoj!** Krome ni peras ankaŭ viajn **libromendojn** kaj **ĝirojn al viaj UEA-kontoj**.

La 94-a **Universala Kongreso** okazos 25.7.-1.8.2009 en Bjalistoko, Pollando. La unua aliĝperiodo estas ĝis la jarŝanĝo, kiam la kotizoj altiĝos. Se vi ne havas aliĝilon, mi volonte sendos ĝin al vi. Eblas aliĝi ankaŭ per retpaĝoj de UEA en adreso <http://www.uea.org>.

Ni en Esperanto-Asocio de Finnlando volonte aŭdos viajn dezirojn, respondos viajn demandojn kaj disponeblas pri Esperanto-aferoj.

Päivi Saarinen, ĉefdelegito

Aŭtunaj tagoj en Heinola

Itä-Häme -gazeto skribis en 22.9.2008 pri la Aŭtunaj Tagoj de EAF, kiuj estis aranĝitaj en Heinola. Laŭ la gazeto esperanto estas facila kiel ludi puzlon. Oni povas facile konatiĝi kun esperanto, ĉar en la interreto estas prezentoj kaj kursoj pri esperanto. Antaŭ la programo de la Aŭtunaj Tagoj esperantistoj prezentis lingvon al ĉiuj, kiuj volis lerni koni ĝin.

Anja Launiainen, kiu loĝas en Kaarina, diris, ke esperanto vere estas internacia lingvo. En universala kongreso de esperanto povus esti miloj de homoj el ĉirkaŭ la mondo kaj oni ne bezonas interpretistojn.

Anja mem estas interpretisto de germana lingvo, sed ŝi parolas kun ŝiaj germanaj amikoj esperanton, se tio estas ebla. "Kiam mi uzas esperanton, mi ne bezonas pensi pri strukturoj de lingvo, mi povas pensi, kion mi volas diri."

Gepatra lingvo de multaj esperantistoj estas iu alia lingvo ol esperanto. Ili uzas esperanton, kiam ili komuniĝas kun homoj, kiuj parolas fremdajn lingvojn. La plej multaj estas esperantistoj en Mez-Eŭropo kaj en Orient-Azio.

Laŭ takso de profesoro Jouko Lindstedt proksimume mil homoj uzas esperanton kiel gepatra lingvo, dek mil homoj parolas lingvon ofte kaj parolas ĝin flue. Cent mil homoj povas paroli kaj skribi esperanton en komunikado. Unu miliono homoj komprenas esperantoskribaĵon kaj dek milionoj konatiĝis iufoje kun la lingvo.

Memlernintoj de esperanto estas multaj. Unu el ili estas Tuomo Grundström, kiu lernis la lingvon, kiam li estis 14-jara. Kiam li estis 16-jara, li partoprenis kongreson en Finnlando. En tiu okazaĵo ne estis lingvaj bariloj, li rakontis.

Hobio de esperanto konserviĝas forta en la vivo de Tuomo. Li interalie tradukis poemojn kaj kantojn en esperanton. Traduko de tango de Unto Mononen, *Satumaa*, estas la plej konata.

Li ankaŭ tradukis "Pikku-Marjan eläinkirja", libron de Lauri Latvala. Oni pensas publikigi

ĝin, sed la tempopunkto por publikigo ne estas decidita.

En malgranda artikolo de Itä-Häme Françoise Rochette parolis pri sia muziko. Ŝi partoprenis en la Aŭtunaj Tagoj de EAF en Heinola kaj ludis sian harmonikon tie. Ŝi vizitis en Finnlando dum unu monato kiel gasto de EAF. Françoise koncertis interalie en Pori, Rauma, Tampere kaj Iisalmi. Ŝi ludis kantojn en koncerto de Heinola en itala lingvo, en hispana lingvo kaj nature en esperanto. Laste ŝi ludis tangon Satumaa, kanto de Unto Mononen.

La gazeto publikigis mallongan liston pri ecoj de esperanto.

Jukka Noponen

Jula festeto de EST 17.12.2008

Jula, kristnaska festeto en Turku okazos en la jam tradicia kunvenejo: La Blua salono de la Malnova urbodomo en adreso Vanha Suurtori 5 atendas nin denove merkrede la 17-an de decembro, 2008 je 16.30. Ni havos festeton kun tradicioj, evangelio, julaj kaj kristnaskaj kantoj kaj ludoj, vizito de la koboldoj. Krome ni memoras la Esperanto-aranĝojn en la pasinta somero, speciale la Universalan Kongreson en Roterdamo. Kafumado 3e, kunportu etan donacon, ĉ. 4e. Gastoj estas tre bonvenaj!

Turun esperantopikkujoulu järjestetään Vanhan raatihuoneen Sinisessä salissa 17. joulukuuta klo 16.30–19.00. Luvassa perinteistä, jouluis-ta ohjelmaa sekä kesätapahtumien muisteluja. Kahvit 3e, mukaan pikku lahja, n. 4e. Tervetuloa!

Kontaktuloj/yhteyshenkilöt Leena Tiisanen, sekretario, tel. 02-2320542 aŭ Tiina Oittinen, prezidanto (vidu p. 2, ks lehden s. 2)

Esperanto-societo en Turku, estraro

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon:

Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@welho.com.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 onni.kauppinen@pp.inet.fi
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen) Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 040 867 2743 www.esperanto.fi/jyvaskyla
- Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. martti.pennanen@phnet.fi
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Olli Pajula), Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. <http://esperantooulu.info/> olli.pajula@gmail.com
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla matti.wallius@ebaana.net
- Esperantoseura Antaüen ry. / Esperantosocieto Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 tapani.aarne@mbnet.fi)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. tiina.oittinen@pp.inet.fi
- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärsvägen 89, 25700 Kimi-to. cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 445023-283606
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 14 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Hämeenlinnan esperantistien yhteystiedot: Verda Kastelo / Markku Sarastamo, Linnan kasarmi. Kenraalin talo. 13100 Hämeenlinna. sarastamo@gmail.com

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla ja Taivalkoskella.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna

aperas dum la jaro

2009

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
1	10.1.	15.1.	5.2.
2	10.3.	15.3.	5.4.
3	10.5.	15.5.	5.6.

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezroj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro: Jäsenet / Membroj:

1/1 sivu/paĝo 100 e 1/1 sivu/paĝo 50 e

1/2 sivua/paĝo 60 e 1/2 sivua/paĝo 30 e

1/4 sivua/paĝo 40 e 1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo:

eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la

oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu

15 C 65, 00530 Helsinki.



Kristnaska prediko

Mia profesio kiel logopediisto rilatas interalie prononcon. Helpi infanojn kun lingvaj perturboj ja ampleksas ankaŭ multon alian, sed korektaĵo de elparolo ja estas unu el la plej videblaj, aŭ pliĝuste aŭdeblaj, terenoj de la logopediista praktiko. Kaj certe ne malplej grava, ja malklara prononco, neaŭdebla voĉo, nedistingebla inter vortoj kaj frazoj grave invalidigas parolon.

Pedagogo elektas materialon de sia instruado kaj ekzercado laŭ kriterioj kaj principoj kiujn li – aŭ, se vi preferas, la instruplano aprobata kaj aplikata – alproprigis. Tiaj valoroj estas interhoma kaj interpopola akcepto, aprobo, tolero. Socia kompetento sen misa rivaleco. Internacia kuneckzisto en vera harmonio.

La sono /r/ estas unu el la tri plej ofte trovendaj aŭ korektendaj en lingvo finna kaj supozeble en tre multaj aliaj. Ĝi lokiĝas – havas hejmon – en la buŝo samloke kun /d/ kaj /n/. Do /r/ kutime troviĝas kaj ekzerciĝas helpe de siaj samlokanoj, kiuj kutime senprobleme prononciĝas kaj do estas helpaj sonoj (iukaze tamen necesas ankaŭ ilin unue trovi kaj precizigi).

La sonoj /n/, /d/ kaj /r/ do estas tri amikoj, kiuj trovinte unu la alian tiel ĝojas, ke ili pe-

tas knabinon Sandra helpi en ekzercado. Ŝi tion volonte faras kun la oportuna meza konsonantaro en la nomo; multfoje ĉiutage ŝi revenas el la buŝeto.

Sandra estas monduma fraŭlino, kiu konas ĉiujn landojn kaj ĉie havas amikojn. Ŝi venigas al la helpantaro de la /r/-ekzercado tri knabojn. Ili estas Mandrak, Andrej kaj Indrek. La knaboj estas inter si bonaj amikoj, kvankam ili loĝas iom dise, ĉiu ĉe nia maro, sed en diversaj landoj. Lernanto ses-naŭjara scias divene proponi, el kiuj landoj la knaboj venas – helpas ankaŭ mapo surtable, en kiu Baltmaro bluas kaj interalie la hejmlandoj de la knaboj la bluan ĉirkaŭas. Kiujn landojn proponas vi?

Niaj Mandrak, Andrej kaj Indrek estas knaboj, kiuj ne lasas fuŝi sian amikecon, ke ili venas el landoj mezgranda, granda kaj malgranda, kies registaroj inter si malakordas. Tion inkluzivas tiu elparola ekzercado.

Sandra kaj la knaboj povus esti esperantistoj. Ja ni estas kiel ili. Ja?

Jarfinajn festotagojn kaj prosperan novan jaron sen misa rivaleco, en harmonia kuneckzisto bondeziras

Tuomo Grundström

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy helmikuussa. Jutut 15.1.2009 mennessä EAF:n toimistoon. La venonta numero aperos en februaro. Artikoloj ĝis 15.1.2009 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.

Kopio Niini/Cityoffset, Tampere 2008